

# **Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 10an de aprilo 2014 per Skype.**

(Protokolo aprobita la 28an de majo 2014.)

## **Partoprenis:**

Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim  
Anne Karin Bondhus en Bryne  
Ulf Chr. Lunde en Os  
Herman Ranæs en Trondheim

## **0. Tagordo**

Aprobita. Mankas la sekretario, protokolos Jardar Eggesbø Abrahamsen.

## **1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 6an de marto**

Aprobita.

## **2. Ekonomio**

a) Skagen høyrente 64 528

Skagen vekst 43 650

b) Cato Haugen havis kelkajn elspezojn por NEL, kaj ni kontrolis ke NEL repagis al li. Temas pri aĉetetoj por Esperantonia (vd. protokolon 7.11.2013); kaj temas pri benzino en februaro kiam li veturis de Oslo al Hamar kune kun Douglas Draper por ordigi librojn ĉe membro, kaj kunportis pluraj skatolojn da libroj kaj aliaĵoj reen al Oslo. La estraro de NEL konsentis retroŝte pri tio jam anticipe.

c) Kasisto Anne Karin Bondhus informas ke ŝi sendis la necesan formularon al la banko DNB, kaj sendos ankaŭ al Skagenfondene, tiel ke ni havos la necesan aliron al la kontoj por movi monon inter ili. La formularoj sendiĝis de estrarano al estrarano por kolekti la necesajn subskribojn.

## **3. Landa Kongreso 2015**

Grupo Esperantista de Trondheim neformale decidis, ke la klubo pretas gastigi la Landan Kongreson en 2015, kaj Herman Ranæs provizore rezervis la kabanon *BUL-hytt*a dum junio 2015. Norvega Junularo Esperantista volas aranĝi kunvenon samloke tuj antaŭ la Landa Kongreso. Ni decidis provizore pri Landa Kongreso la 12.–14. aŭ 19.–21. de junio 2015, sed devos interkonsenti kun NJE pri la ekzaktaj datoj. Tion ni faros retroŝte.

## **4. Seminario 2014**

En januaro ni decidis pri seminario fine de oktobro. La temo verŝajne estos artefaritaj lingvoj. Ni pludiskutis la enhavon kaj planas anonci la seminarion en la membrogazeto, sed ni ne volas decidi pri ekzakta dato kaj aliaj detaloj antaŭ ol pli da estraranoj ĉeestos.

## 5. Jarraporto kaj jarkalkulo 2013

La redaktanto de la jarraporto ne povis ĉeesti hodiaŭ, kaj ne laboris pri la jarraporto dum la interkonsiliĝo. La kasisto havas planon pri la jarkalkula laboro.

## 6. Eventualaĵoj

- a) Venis demando, ĉu NEL partoprenos la Movadan Foiiron dum la Universala Kongreso en Bonaero. Ni decidis ne prioritati tion.
- b) Ulf Lunde parolis kun unu el la du *kyrkjetenarar* en Os pri praktikaĵoj de pagoj por prizorgado de la tombo de Haldor Midthus. Ulf ne ricevis definitivan respondon, tial li kontaktos la *kyrkjeveerja* rekte (kp. la protokolon 23.1.2014).

La interkonsiliĝo daŭris 19:35–20:35.

Protokolis Jardar Eggesbø Abrahamsen.

La venonta interkonsiliĝo okazos la 22an de majo 2014. (Prokrastita ĝis la 28a de majo.)